



★^E ¹⁹⁸⁴⁻⁵⁻¹⁰⁴ **starto**



KURACA SANATORIO J. FUČÍK
TEPLICE v Čechách

NOVA KURACA DOMO PRO MALSANOJ
DE LA MOVEBLAJ ORGANAROJ

INFORMOJ SENDOS KAJ CERTIGOS
KURACADON

BALNEA, reprezentace českosloven-
ských lázní a zřídél,



11001 Praha 1, Pařížská 11, tel.: 263777, telex: 122 215

ADIAŬ, BATALANTO...

/ Al Josef V í t e k /

El niaj vicoj vi forpasis
kaj restas post vi vaka dom',
kaj rememoro, kiun lasiĝ
post si merita bona hom'.

Jardekojn da fekunda vivo
oferis vi al nia cel
kun sindonemaj kaj aktivo
sub nia flag kun verda stel'.

Sur gvida loko vi postenis,
kun persistemo kaj sen lac
vi direktilon firme tenis
sur nia vojo al la pac'.

Sur glora paĝo de honoro
vin ciam notos histori',
pri viaj fryktoj de laboro
konscios daŭre ciuj ni.

Tro frue devis vi foriri,
finiĝas trjste homa voĵ',
al ni adiaŭ restas diri,
adiaŭ por la lasta foj'...

J. Kořínek

Rememoro al unujara datraveno de
la morto de unua prezidante de ĈEA.

La 69-a Universala Kongreso de Esperanto, kunvenante en Vancouvero, Kanado, de la 21-a ĝis la 28-a de julio 1984, kun 802 partoprenantoj el 46 landoj, kaj pritraktinte la temon LINGVAJ MINORITATOJ - ĈU NUR NACIA FENOMENO?,

konstatas

1. ke ĉiu homo havas rajton al sia lingvo kaj kulturo kaj ke la homaro havas devon labori por konservi la diversecojn de lingvoj kaj kulturoj, samtempe ebligante socian komunikadon kaj ekonomian kaj socian evoluon;
2. ke en la internacia sfero, same kiel en la nacia sfero, ekzistas fortaj kaj malfortaj lingvoj;
3. ke tiu malegaleco estas rezulto de ekonomiaj, politikaj kaj sociaj kaŭzoj;
4. ke ĝi donas avantaĝojn al la demaskaj parolantoj de tiuj ĉefaj lingvoj kaj metas sargon sur la ekonomiajn kaj edukajn sistemojn de la landoj kun pli malfortaj lingvoj aŭ kun multaj diversaj lingvoj;
5. ke tiuj avantaĝoj kaj malavantaĝoj estas evidentaĵoj en la ĉiutaga internacia dialogo de la ŝtatoj kaj de unuopuloj;
6. ke ili estas aparte evidentaĵoj en la lingvaj servoj de la grandaj interŝtataj organizoj, kiuj laboras ĉefe por liveri tradukadon kaj interpretadon inter la grandaj lingvoj;
7. ke necesas rekoni la internacian malegalecon de lingvoj kaj labori por minimumigi ĝin;
8. ke la Internacia Lingvo Esperanto, tra preskaŭ cent jaroj de kontinua uzo en plej diversaj cirkonstancoj, montris sian kapablon ŝirmi la malgrandaĵajn lingvojn kaj meti ĉiun internacian komunikadon sur egalan nivelon;
9. ke tiu lingvo, precipe en kombino kun moderna komunika tek-niko kaj movaj progresoj en automatigita tradukado, donas bonajn perspektivojn por solvi almenaŭ parton de la problemoj de internacia komunikado kaj ebligi grandekalan demokratiigon de la internacia lingva komunikado;
10. ke tiu demokratiigo povus doni avantaĝojn al la malgrandaĵaj lingvoj, samtempe ebligante ilian ŝirmigon kontraŭ la altrudo de la grandaj lingvoj kaj kulturoj kaj ilian pli vastan uzadon en internaciaj organizoj.

La Kongreso tial rekomendas

ke la ŝtatoj kaj internaciaj instancoj, la edukaj instancoj en la diversaj landoj, kaj tiuj kiuj respondecas pri interŝtata komerco, turismo kaj kulturaj intersangoj, ekzamenu la potencialon kaj perspektivojn de Esperanto kiel lingvo por internacia uzado kaj por la demokratiigo de lingvo-uzo en internaciaj rilatoj.

II.

La lingvoj de la mondo uzas diversajn esprimmanierojn, sed tamen estas ĉiuj same bonaj. La gramatikaj formoj povas esti analizaj /signifo kaj gramatikaĵo formas du vortojn, ekz. "al patro"/, sintezaj /signifo kaj gramatikaĵo formas unu vorton, ekz. "patron"/ aŭ polisintezaj /kunmetitaj, ekz. "patrolando"/. La ĉina lingvo uzas sole analizajn formojn. Ĉe plejparto de lingvoj estas la analizaj, sintezaj kaj polisintezaj elementoj miksitaj. Se la sintezaj formoj estas neregulaj, oni parolas pri lingvo fleksia /vidu la ĉeĥan "Praha - Praze" aŭ la akuzativon: muž-e, pán-a, žen-u, náš-i, měst-o, staven-i/, dum en la aglutinaj lingvoj oni algluas regulajn finaĵojn al la nasangeblaj vortradikoj /patr-o-n, patr-o-j-n/. Aglutinaj estas ekzemple la hungara, la turka, la gruzaj kaj ankaŭ Esperanto. La araba havas introfleksion, t.e. oni kreas la gramatikajn formojn ŝangante vokalojn de la vortradiko /waladun - knabo, waladin - de knabo, waladan - knabon/, la indonezia kreas la pluralon per polisintezaj duobligo /orang - orang-homoj/.

Parencaj lingvoj formas lingvan familion, sed ne ĉiam estas facile la lingvojn klasii, ĉar multaj geografie najbaraj lingvoj influas unu la alian, eĉ se ili ne estas parencaj. Per la hindeuropaj lingvoj parolas 1500 milionoj da homoj /hindaj 500, iranaj 45, slavaj 250, baltaj 4, germanaj 370, latinidaj 360, greke 10, albane 3, armeje 4, kelte 4/, semido-hamidaj 120, ugrofinnaj 23, altaĵaj 70, tibeto-ĉinaj 1000, dravidaj 120, malajzi-polineziaj 140, aŭstraliaj 40, japane 100, koree 40, afrikaj 150, indianaĵ 25 /milionoj da homoj/.

Apartan grupon formas la t.n. artefaritaj lingvoj, kiuj povas esti masinaj /por komputiloj/, filozofiaj /por priskribi filozofiajn kaj matematikajn teoriojn/ kaj kvazaunaturaj /havantaj la samajn kvalitojn kaj aplikon kiel la t.n. naturaj lingvoj/. La artefaritaj lingvoj ekzistas gestaj /ekz. por surdmutuloj/, pazigrafioj /internacia skribo, trafiksignoj/, ĥemiaj formuloj/ kaj pazilalioj /sonaj lingvoj/. Apriora pazilalio havas ĉiujn vortojn nove elpensitaj, dum aposteriora pazilalio eluzas vortojn el naciaj lingvoj, precipe tiujn esprimojn, kiuj internaciigis. La skemismaj lingvoj faras la ortografion fonetika kaj la gramatikon regula, dum la naturalismaj projektoj simpligas ja la gramatikon, sed konservas la historian ortografion kaj multajn malregulaĵojn de la derivado. Tiom regulaj projektoj kiel Esperanto estas nomataj hiperkemismaj /hiper - super/, malpli regulaj kiel novialo estas hiposkemismaj /hipo - sub/. La plej naturalismaj lingvoj kiel INTERLINGUA estas hipernaturalismaj, malpli malregulaj kiel okcidentalo estas hiponaturalismaj. Ankaŭ en Esperanto interbatalas tendencoj skemismaj kaj naturalismaj /agrokulturo - agrikulturo, toreisto - toreodoro/.

En multaj kolonioj ekestas t.n. piĝinoj, simpligitaj formoj de la angla, franca, hispana, hinda, svahila k.a. /mi doni al vi morgaŭ du pamo/, kiuj estas uzataj en la kolonioj kiel help-lingvoj. Se piĝino igas por siaj parolantoj gepatra lingvo /ekzemple angla piĝino en Jamaiko kaj franca en Haitio/, ĝi parolas pri lingvo kreolizita. Kreolizaĵoj penetras ankaŭ en la literaturon kaj farigas normalaj, plenvaloraĵ kulturaj lingvoj.

Simile ankaŭ la Internacia Lingvo paŝo post paŝo pliperfektigas kaj adaptigas por la bezonoj de la moderna homaro. Ĉar ĉi-u uzanto devas ĝin lerni kiel fremdan lingvon kaj pene parkeri la vortojn, ĝi tendencas eluzi ĉiun sian vortradikon multe pli vaste ol tion faras la naciaj lingvoj /en pli multaj derivaĵoj/. Al la mondlingvoj ĝi povos vicigi, kiam ĝi tralaboros sian fakliteraturon kaj kapablos transdonadi scienc-teĥnikajn informojn same bone kiel la sport-kulturajn, ĉar sen ili neniu nuntempa stata ekonomio povas ekzisti. La pliperfektigon de la Internacia Lingvo ne povas plenumi la ministerioj de edukado, kiuj ne scias Esperanton, sed sole la esperantistoj mem. Estas tial malprudente anstataŭ labori nur monotone plendi, kial la ministerioj ne ordonos tiun laboron - la registaroj kun siaj ordonoj estas senpovaj, se esperantistoj ne antaŭpreparos ĉion necesan. Necesaj estas lernolibroj por personoj de ĉiuj aĝoj, de ĉiuj fakoj kaj de ĉiuj nacioj kaj ankaŭ la koncerna literaturo. Kiam la esperantistoj ebligas al la homaro uzi Esperanton, tiam la registaroj povos la uzadon rekomendi aŭ eĉ ordoni - sed fari tion antaŭtempe povus la tutan aferon fusi, ĉar montrigus, ke la projekto ankoraŭ ne estas plene preparita.

Antaŭ ducent jaroj saĝis, ke la ĉeĥa lingvo estas pereigita, kaj la ĉeĥaj patriotoj, klopodantaj ĝin savi, estis primokataj kiel nenormalaj, fanatikaj naŭvuloj, penantaj fari neblaĵojn. En Prago parolis la ĉeĥan nur ĉirkaŭ kvindek da homoj kaj ekzistis sole unu ĉeĥlingva gazeto /de Kramerius/. Tamen la naŭvistoj sukcesis kaj la ĉeĥa lingvo nun apartenas al la plej kulturitaj en la mondo. Kio estis kauzo de tiu sukceso?

M. Malovec

KARL MARX KAJ FRIEDRICH ENGELS PRI LA "LANGUE UNIVERSELLE" / Daŭrigo. /

4. REZOLUCIOJ PRI LA UNIVERSALA LINGVO

Fojfoje en la interlingvistika literaturo oni trovas indikojn pri tio, ke dum la kongresoj de la Internacia Laborista Asocio en Genevo /1866/ kaj en Lausanne /1887/ estis akceptitaj rezolucioj pri universala lingvo. La ĉi-koncernajn literaturindikojn donas RATKAI /1978, 21 - 27/, kiu ankaŭ tre kritike traktas la foje entuziasmajn interpretojn de tiuj faktoj. La situacio, laŭ la bona superregardo de RATKAI /kiu ankaŭ entenas la necesajn fontindikojn/ estis jena:

En la tagorda propono kompilita de Marx por la Unua Kongreso de la Internacia Laborista Asocio en Genevo 1866 /3.-8. sep-

tembro/ mankis iu ajn propono pri universala lingvo. Tiu problemo estis sisteme nek aktuala nek politike grava. Tamen dum la kongreso, kiun Marx ne ĉeestis, oni ankaŭ rezoluciois pri plej diversaj aferoj, ĉefe pro la influo de etburgaj fortoj, kiuj volis fari diskutklubon el la kongreso kaj forrabis gravan tempon por pli esencaj taskoj /Fenomeno konate ankaŭ en modernaj Esperantaj asocioj kaj organizaĵoj/. Pro tio lige al memuaro de M. Leneveu pri la simpligo de la ortografio de la franca lingvo, oni rezoluciois:

"La kongreso simpatias al tiuj societoj kaj al apartaj homoj, kiuj laboras je simpligo de la franca ortografio por faciligi ĝian lernadon al tiuj homoj, kiuj ne posedas la tempon sufiĉan por lernado, kaj ĝi aprobas tiujn homojn, kiuj penas verki Universalan lingvon por firmigi la integradon de homoj de diversaj nacioj kaj fari ilin plej fruktodonaĵ por la feliĉo de la homoj."

Dum la kongreso en Lausanne /2.-8.9.1867/ denove prudonistoj sukcesis akceptigi rezolucion pri la sama temo, kvankam la plej aktualaj diskutendaj demandoj estis, kiel fari el la Internacio centron de la batalo por la liberigo de la proletaro kaj kiel decidi pri la demando de la laboristkredito.

Tamen la kongreso denove akceptis rezoluciojn nekoncernajn al la ĉeftemoj, i. a. ankaŭ jenan:

"La kongreso konsideras, ke universala lingvo kaj reformo de ortografio estus bona afero por ĉiuj kaj forte kontribuas al la unueco de la popoloj kaj al la frateco inter la nacioj."

Marx kompilis broŝuron kun la plej gravaj rezolucioj de la ĝenerala kaj brusela /8.-13.9.1868/ kongresoj. En tiu broŝuro mankas la rezolucio pri la Universala lingvo, simple pro tio, ĉar la broŝuro devis enteni la plej gravajn rezoluciojn. Al tiuj la menciitaj ne apartenas.

Ĉio ĉi tamen neniel signifas, ke Marx estis kontraŭ la reformo de la franca ortografio aŭ kontraŭ universala lingvo. La problemoj simple ne gravis dum la menciitaj kongresoj.

5. PROUDHON PRI LA UNIVERSALA LINGVO

En la Internacia Laborista Asocio Marx kaj Engels batalis por scienca socialismo kaj sekve kontraŭ la influo de etburgoj, al kiuj apartenis la franca etburga socialisto Pierre Joseph Proudhon /1809 - 1865/. Por kritiki lin, Marx trastudis la tutan verkon de Proudhon. Pro tio li ankaŭ konatigis kun ties verko "Essai de grammaire générale", kiu aperis 1837 9/. En letero al Schweitzer, ĉefredaktoro de la gazeto "SOZIALDEMOKRAT", Marx skribis 1865:

"Proudhons erster Versuch erinnert mich nicht mehr. Seine Schularbeit über die "Langue universelle" zeigt, wie ungeniert er sich an Probleme wagte, zu deren Lösung ihm noch die ersten Vorkenntnisse fehlten." /MESSU 348: Pri la unuaj provoj de Proudhon mi ne plu memoras. Lia lerneja verkaĵo pri la "Langue universelle" montras, kiel neĝenite li kuraĝas trakti problemojn, pri kies solvo al li mankis ankoraŭ la unuaj antaŭscioj/.

Do tiu citaĵo tute ne entenas iun nuancan takson pri la problemo de la universala lingvo, sed ĝi estas interesa. Marx nome implicite postulas certan scinivelon, se oni traktas pri tiu problemo. Tiu lia juĝo, cetere, validus por multegaj auto-

roj de planlingvaj projektoj, ĉe kiuj oni rapide trovas la naivecon kaj mankon de baza lingvistika scio. Kaj ties dilettantismo estas unu el la kaŭzoj, ke lingvistoj sufiĉe skeptike rilatas al la planlingvo tute principe.

6. ENGELS PRI WEITLING

Wilhelm Christian WEITLING /1808 - 1871/ utopia komunisto kaj aktivulo de la germana "Ligo de Justuloj" diversloke en siaj verkoj skribis pri la universala lingvo, i. a. en sia ĉefverko "Garantioj de la harmonio kaj libereco", aperinta en la jaro 1842 10/. Li skribas:

"... sekve de la trafiko popolojn kunliganta jam ne eblas plua ekzisto de la lingvoj kaj landlimoj, kiuj malakcelas la disvastiĝon de la novaj ideoj kaj inventoj.....de post la invento de la fervojo fariĝis sentebla la rolo domaĝa kaj malakcela de la menciitaĵoj.....Jam la fervojo atentigas la homojn, ke necesas enkonduki mondlingvon, por ne menci la perfektigo - perspektivojn de la aerŝipado.....La enkonduko de sola lingvo brule necesas por fari progreson de la sciencoj" /p. 99 - 100 /. En la tria eldono de la verko 1849, WEITLING jam uzas la terminon "universala lingvo".

WEITLING ankaŭ verkis eseon /perdiĝintan/ kun la titolo "Allgemeine Denk- und Sprachlehre nebst Grundsätzen einer Universalssprache der Menschheit" /Ĝenerala instruo pri la pensado kaj la lingvo kun bazaj trajtoj de universala lingvo/. En sia verko li faris kelkajn proponojn pri simpla lingvo kaj i. a. opiniis, ke necesas forigi la dativon kiel "aristokratan inventaĵon 11/.

En letero al Marx 1853 Engels faras rimarkon pri la projekto de WEITLING kaj skribas: "Ich habe mir dabei drei Wochen als Maximum für das Persische angesetzt.....Für WEITLING ist es ein Pech, dass er kein Persisch kann, er würde seine langue universelle toute trouvée haben, da es meines Wissens die einzige Sprache ist, wo kein Krakeel zwischen Mir und Mich entsteht, da der Dativ und der Akkusativ sich immer gleich sind." /MESSU 572 - 573: Mi fiksis por mi kiel maksimumon tri semajnojn por la persa.....Estas malfeliĉo por Weitling, ke li ne konas la persan, li estus tute trovinta sian langue universelle, ĉar ĝi laŭ mia scio estas la sola lingvo, kie ne ekestas kverelo inter al mi /mir/ kaj min /mich/, ĉar la dativo kaj la akuzativo estas ĉiam samaj/.

/Daŭrigota./

NOTOJ:

9/ PROUDHON, P. J. /1837/: Essai de grammaire générale. En: Nicolas-Sylvestre BERGIER: Les éléments primitifs des langues. Besancon.

10/ Represo de la verko: WEITLING, W. /1955/: Garantien der Harmonie und Freiheit. Berlin /Akademie-Verlag/ 1955.

11/ Kp. MARX-ENGELS-Werke, vol. 28, Berlin /Dietz/ 1963, p.696.

LA KOMITATO DE TEJO

kunsidante dum la 40-a Internacia Junulara Kongreso en SWANWICK, en Britio,

diskutinte en ĝenerala kunveno pri la eblecoj partopreni en kaj kontribui al la programo de la Monda Festivalo de la Junularo kaj Studentoj en MOSKVO 1985,

alvokas al la Landaĵ Sekcioj de TEJO en la tuta mondo kunlabori en la preparoj de la Festivalo sur landa nivelo,

rekomendas al siaj koncernitaj konstantaj komisionoj kaj al la estraro de TEJO ebligi vastan partoprenon de junaj esperantistoj en tiu Festivalo kaj okazigon de programeroj speciale interesaj por parolantoj de la internacia lingvo Esperanto,

emfazas la gravecon tiurilate kunlabori kun neesperantistaj junularaj organizoj kiel Monda Federacio de Demokratia Junularo kaj Internacia Unuiĝo de Studentoj,

instigas junajn sovetaĵn esperantistojn ludi aktivan rolon en la preparlaboroj en la invitanta lando,


atentigas pri la speciala karaktero de TEJO, kie kiel internacia organizo estas neutrala i. a. rilate al politikaj demandoj disde la lingva problemo. Tiu statuto preskribita neŭtraleco devas esti la bazo de nia kontribuo al la preparlaboroj kaj al la okazigo de la Festivalo, tiel ebligante intersangon de ideoj kaj kunlaboron trans la politikajn kaj sociajn disdividojn de la mondo cele al paco kaj internacia amikeco.

-9-0-0-0-

SEMINARIO en la urbo Pardubice inter 8-9.de septembro, aranĝitan por la gvidantoj de la asociaj lokaj grupoj, sekcioj kaj komisionoj partoprenis ĉirkaŭ 50 da personoj. Oni tie parolis pri eksterlandaj rilatoj de ĈEA, pri ekonomiaj rilatoj, pri rolo de asociaj preskriboj kaj statuto kaj ĉefe pri la nova situacio en kelkaj LG pro senco de la organiza strukturo ĉe sindikataj kulturej domoj, kie plejmulto el ili laboris. Sur la foto kelkaj el ili.



Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA



A E S T ' 8 4 E N B R N O

Inter la 31-a de aŭgusto kaj la 2-a de septembro 1984 okazis en BRNO Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko. Ĝia ĉefa temo estis "Perspektivoj de nutraj-produktado en la mondo. Dua temo estis prilingva. Al la unua temo rilatis 12 prelegoj, lingvo-temaj estis 9 prelegoj.

Aligis 63 esperantistoj, plejparte fakuloj el 9 landoj. Diskutado al la unuopaj prelegoj estis kelkfoje tre vigla, sed precipe neoficialaj diskutoj kaj konsultigoj estis tre utilaj.

En la lingva parto temis pri kunordigado de terminologiaj laboroj sub gvido de la Terminologia sekcio de la Scienca Eldon-Centro de UEA en Budapeŝto, kaj pri pli larĝa tutmonda - faka kunlaboro.

Tre agrablan etoson preparis la folkloro muzika grupo de la agrokultura kooperativo VRACOV /Suda Moravio/ per sia muziko, kantado kaj vin-gustumado. La vesperon plibuntigis ankaŭ grupo de sovetaĵaj esperantistoj, kiuj prezentis kelkajn Esperantajn kaj armenajn kantojn.

BEZONO DE LA KUNLABORANTOJ

Dum la diskuto en BRNO montrigis aktuala bezono de pluj kunlaborantoj en ĝia sekcia laboro, au faka au organiza.

Multaj fakoj ankoraŭ "dormas". Tute ne gravas, ke vi eventuale estas sola de via fako en Ĉeĥoslovakio. Ni ebligas al vi kontakton kun eksterlandoj.

SCIENC-TEĤNIKAJ PUBLIKAĴOJ

Ni volus atentigi niajn membrojn, ke en la sekretariejo de ĈEA en Prago stokas multaj valoraj Esperantaj publikaĵoj, precipe el scienc-teĥnika agadsfero.

Okaze de via vojaĝo Pragon, au ankaŭ per poste, acetu ilin! Kelkaj estas tre oportunaj ki el donaco por viaj eksterlandaj amikoj.

Baldgaa disvendado de la publikaĵoj ebligas eldoni pluajn verkojn.

VERKISTOJ - KONTAKTU NIN!

De tempo al tempo oni aŭdas, ke kelkaj niaj esperantistoj ellabogadas kaj tradukas fakajn au prilingvajn tekstojn au librojn, terminarojn au vortarojn, sen anticipa interkonsento kun la sekcio.

Ni petas ilin, kontaktu nin por priparoli la eblon eldoni vian laboron! Povus okazi, ke iu alia jam preparas la saman au similan verkon, au la laboro ne konvenas lau amplekso au formo al la eldonplano.

Per ci tiu atentigo ni volus eviti eventualan seniluziigon, se kelkaj verkoj ne povos esti eldonitaj.

BV. INFORMI NIN PRI VIA AGADO

Ellaborinte la jarraporton de nia scienc-teĥnika sekcio, ni kelkfoje ekscias, ke iu faris ion, kio indus esti envicigita en la jarraporton de la sekcio.

Sekve ni petas ĉiujn, bonvolu informi la sekcion /la se-

kreterion/ pri via agado, plej-eble ĉiujare en novembro.

Rubrikon nun preparas Jiří LAUBE, sekretario de la sekcio.

36-A I F E F - KONGRESO EN S L Â N Ĉ E V B R J A G

Jam duan fojon - post 1968 - Popola Respubliko Bulgario farigis kongreslando de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio /IFEF/, kiu ĉijare celebras sian 75-jaran jubileon. La ĉijara 36-a IFEF-kongreso okazis la 12-an ĝis 18-an de majo en la beleĝa mara somerrestaĝejo Slancev Brjag - "Suna Bordo".

Celante pli vaste diskonigi inter la bulgara publiko la 36-an kongreson de IFEF, la Kongresa Komitato organizis antaŭ komenco de la kongreso du gazetaraĵajn konferencojn. La unua okazis la 7-an de majo 1984 en Sofio, la dua la 11-an de majo en la kongresloko mem - Suna Bordo. Ambaŭ konferencoj pasis tre sukcese sub gvidado de Donco Hitrov - ĉefredaktoro de revuo "Bulgara Esperantisto" kaj ĉefo de la Gazetara Servo. La partoprenantaj ĵurnalistoj kaj reprezentantoj de radio kaj televido estis detale informataj per prezidantaro de IFEF pri la historio de IFEF, pri ĝia faka laboro, pri la laboro de la terminara kaj fakpreleĝa komisionoj kaj pri la plej gravaj kunsidoj kaj kulturaj programoj de la antaŭstaranta 36-a kongreso.

La 12-an de majo en halo "ZAMENHOF" en la Kongresejo estis malfermitaj du ekspozicioj: La ekspozicio "Evoluo de la Bulgaraj Ŝtataj Fervojoj" rakontas pri la evoluo kaj nuna stato de la fervojtransporto en Bulgario kaj pri la socialaj akiraĵoj de la bulgaraj fervojistoj.

Tre allogaj kaj atentokapta farigis ankaŭ la dua ekspozicio - "Bulgario - antikva kaj nuntempa", kiu per multnombraj bildoj, bildkartoj kaj filatelajoj konigas la longan 1300-jaran historian vojon de la bulgaraj lando kaj popolo, prezentante arkeologiajn monumentojn, antikvan arton, ikonajn, folklorajn kostumojn, belajojn de la bulgara naturo.

Solena inaŭguro de la 36-a kongreso de IFEF okazis dimanĉe la 13-an de majo en la beleĝe ornamita konstruaĵo Bar Variete, kie okazis plimulto de ĉefaj programoj de la kongreso. La scenejon de la kongreshalo "ZAMENHOF" ornamis granda slogano "LA RELOJ LIGAS LA LANDOJN, ESPERANTO - LA POPOLOJN", kiu fakte estas la devizo de IFEF.

La solenan inaŭguron partoprenis preskaŭ naŭcent delegitoj el 23 landoj kaj multaj honoraj gastoj, inter ili la alta protektanto s-ro Vasil Canov, ministro de la transporto de Popola Respubliko Bulgario, Ĥristo Gorov - prezidanto de Bulgara E-Asocio, ing. Petar Todorov, reprezentanto de UEA, Mio Petek, vicministro de transporto en Kroatio /SFR Jugoslavio/ kaj reprezentanto de FISAIK /Internacia organizo por kulturo kaj arto de europaj fervojistoj/, Metodi Djakov, sekretario de CK de la Sindikato de Transportlaboristoj de PR Bulgario, la urbestro de Nesebar, prof. Yoshiaki Mizuno el Japanio kaj aliaj.

La ministro de transporto de PR Bulgario Vasil Canov dum sia salutparolado interalie diris al la kongresanoj:

... "Vi venas fortaj kun unu neanstataŭebla rimedo por konst-

rua interkomunikigo - la Internacia Lingvo Esperanto. Utiligu ĝin por vasta kaj utila intersango de profesia sperto. Utiligu ankaŭ la favoran eb-
lon, kiun ni disponigas al vi - veturi dum la kongresaj tagoj senpage per Bulgaraj Ŝtataj Fervojoj sur la tuta teritorio de nia lando. Vidu ĝin, ekkonu ĝin kaj forportu ĝin en viaj pensoj - tia, kia ĝi estas - lando de paca kreado, de evoluinta ekonomio, de antikva kaj moderna kulturo. Lando, kiu ne avidas fremdajn teritoriojn kaj riĉaĵojn, kiu strebas al paco kaj amikeco inter la popoloj.

Per la Internacia Lingvo Esperanto via kongreso estigu nova kontribuo al la paca, afereca interkomunikigo de la popoloj, al la homa progreso!.."

Krom salutparoladoj de la prezidanto de LKK s-ro Marin Marinov kaj prezidanto de IFEF s-ro Joachim Giessner el FRG okazis mallongaj salutparoladoj de aliaj gastoj kaj reprezentantoj de ĉiuj partoprenantaj landoj. Ĉeĥoslovakion reprezentis prezidanto de FS de ĈEA s-ano Jaroslav Kašparec. Sed la solena inaŭguro ne estis nur solenaj salutparoladoj. Oni devas menci i ankaŭ pri la altnivelaj kulturaj programoj de Esperanta horuso "RODNA PESEN" /"HEJMLANDA KANTO"/ el urbo Targovište, pri solena parado de uniforme vestitaj fervojistoj el diversaj landoj - simbolo de la internacia amikeco de nia kolegaro kaj pri la tradicia komuna fottado ĉe jam brilanta varma suno super SUNA BORDO, kiu okazis tuj post la oficiala malfermo de la 36-a IFEF-kongreso.

La riĉa programo de la kongreso enhavis krom prelegoj kaj laborkunsidoj ankaŭ vicon da kulturaj programoj. Ni devas almenaŭ menci i la akcepto-

regalon de la ministro Vasil Canov por ĉiuj kongresanoj kaj gastoj en la salonegoj de hotelo "Trakia" kaj akcepton de la distriktestro de Burgas, dum kiu s-ino Todorka Murgeva, la vicprezidanto de la Distrikta Popola Konsilantaro en Burgas akceptis la IFEF - estraranojn kaj membrojn de LKK. Ni menci i ankaŭ la komunan viziton de la urbo Burgas, dum kiu ni akompanante de spertaj ĉiĉeronoj vizitis la ĉemaran parkon kaj gulis la belegan panoramon de la Burgas-golfo kaj de la urbo, kiu estas granda distrikta centro kun miljara historio. Ni ne preterlasu la komunan viziton de la nove konstruita teatro-opero "Adriana Budevska" en Burgas, dum kiu la Bulgara Esperanto-Teatro sub gvido de Kunco Vălev prezentis por ni la komedion "La milionulo" de la klasikulo de la bulgara literaturo Jordan Jovkov. Sed ankaŭ la solena koncerto, kongresa balo kaj kultura programo post oficiala fermo de la kongreso ĉarmigis ĉiujn per sia alta kultura nivelo.

El fakaj programeroj ni menci i almenaŭ la altnivelan fakprelegon "Stato kaj perspektivoj de disvolvado de la fervoja transporto en PR Bulgario" - verkita de la eminenta bulgara fervojisto kaj ĉefredaktoro de gazeto "Transporten Glas", ing. Rad Sinigerov. Ankaŭ posttagmeza programo "Fervojaj aktualaĵoj" pri la interesaj kaj movaĵoj en fervoja trafiko en 11 landoj altiris multajn partoprenantojn kaj pruvis la grandan intereseon al tiuj koncizaj kontribuadoj, precipe al tiuj akompanataj de diapozitivaj. Same la kongresaj plenkunsidoj, E-kurso laŭ ĉe-metodo, kunvenoj de la terminara komisiono kaj aliaj fakaj kunvenoj montris grandan intereseon de la kongresanoj pri la arangoj.

Sed al ĉiuj kongresanoj de IFEF apartenas ankaŭ la ekskursoj. Krom la jam menciita komuna ekskurso al Burgas okazis du amase partoprenintaj ekskursoj. Dum la unua ni frumatene, la 17-an de majo forveturis per autobusoj, ornamitaj per Esperantaj flagetoj al la historiaj lokoj Ŝumen - Madara - Pliska. La pitoreska vojo sekvis la marbordon ĝis urbo Varna - la perlo de la Nigra Maro. Poste, tra la interno de la lando, oni direktiĝis al Madara, kie havis la okazon kuniĝi kun la plej malnova el Eŭropo surroka bareliefo, konata sub la nomo Rajdanto de Madara. Poste ni alvenis la malnovan urbon Ŝumen, kie okazis akcepto en la salonoj de la granda centra restoracio. Poste ni trarigardis la urbon kaj la grandan monumenton dedicitan al la 1300-jariĝo de la bulgara stato.

Post tio ni veturis al la ruinoj de la iama bulgara ĉefurbo Pliska, memorigantaj pri la malnova bulgara kulturo kaj konstruaro.

Dum alia ekskurso la aliĝintaj partoprenantoj vizitis per autobusoj urbon Varna kaj la faman somerrestadejon "ZLATNI PJASACI" /"ORA STRANDO"/ - kaj havis la plezuron ĝui ĉirkaŭ 30 km longan plaĝstrion el mola orkolora sablo.

Dum pli granda parto de la

kongresanoj el nesocialismaj landoj partoprenis la postkongresan ekskurson al Turkio, ni aliaj plejparte uzis eblecon senpage vojaĝi per bulgaraj fervojoj inter la 7-a kaj 23-a de majo por viziti siajn korespondamikojn kaj kolegojn en Bulgario.

La ĉijara 36-a kongreso de IFEF montris grandan intereseon flanke de la bulgaraj gazetaroj, radio kaj televido, kiuj aperigis kaj elsendis vicon da informoj kaj raportoj pri la kongresarangoj. Same Filma skipo de la Internacia Ligo de Esperantistoj Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj /ILEF/ faris multajn fotojn por plenlonga televida filmo pri la 36-a IFEF-kongreso.

Dank' al la granda helpe kaj subteno de la bulgaraj ŝtataj kaj socipolitikaj instancoj al laboro de la kongreso oni eblas pritaksi la ĉiĵaran 36-an IFEF-kongreson kiel tre sukcesa. Laŭ proklamo de la prezidanto de IFEF s-ro Joachim Giessner el FRG "la laboro de nia ĉijara kongreso en Bulgario nepre kontribuos por plua paca kunlaborado inter la esperantistoj-fervojistoj el ĉiuj landoj."

La venonta 37-a IFEF-kongreso okazos la 17-an ĝis 23-an de majo 1985 en VEJLE en DANLANDO.

J. Tomišek

FARIĜU KUNREDAKTORO DE ESPERANTO-ELSENDUJ!

RADIO POLONIA, Esperanto-Redakcio,
00-950 VARSOVIO, P.O. Box - 46,
Pollando

Karaj Geaŝkultantoj!

La pasanta nunjare 40-jariĝo de Pola Popola Respubliko inklinigas al la ŝpinaĝo de pensoj, kiuj ĉirkaŭprenas ne nur la pasinteco, sed ankaŭ la nunon kaj la vizon de nia estonteco.

La jubilea jaro farigis en nia lando periodo de profunda diskuto pri la trapasita vojo, pri la premisoj de niaj atingoj kaj fontoj de nesuficiaj, pri la socialismaj transformigoj en Pollando kaj pri ilia signifo por nia tuta nacio.

Nian propran bildon de la Jarkvardeko ni dezirus kompletigi per la opinioj kaj pensoj de niaj auskultantoj kaj ĉiuj, kiuj signtenas kun simpatio al la pola popolo. Ni kredas do, ke ankau vi volos prezenti al ni viajn rimarkojn pri tio:

KIO KARAKTERIZA EN LA POLA REALO DE LA PASINTA JARKVARDEKO ASOCIACIAS ĈE VI KUN POPOLA POLLANDO KAJ KIAJ - LIGE KUN ĈI TIO - VENAS AL VI PENSOJ? /oni povas prezenti unu au kelkajn ekzemplojn/

Modesta kontribuo al la Jarkvardeko de Popola Pollando estas - laŭ nia opinio - la ĉiutagaj Esperanto-elsendoj de RADIO POLONIA, kiu jam 25 jarojn servas al la vastskala informado pri la maskiglando de Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto kaj praktike kontribuas al la rapida informado ene de la internacia E-movado.

Lige kun la nunjara duobla jubileo de niaj radio - elsendoj /la 4-an de aprilo - la 25-a datreveno de la unua disaŭdiĝo, la 14-an de aprilo - la 25-mila radioelsendo! ni petas niajn geauskultantojn kaj ĉiujn radioamikojn tra la mondo pritrakti la jenan temon:

KIO IGIS VIN AŬSKULTI /aŭ: KIAL VI AŬSKULTAS/ LA ESPERANTO-ELSENDOJN DE VARSOVIO? KIAN SIGNIFON POR VI PERSONE, POR VIA INFORMIĜO PRI POLLANDO, HAVAS LA E-ELSENDOJ DE RADIO POLONIA?

Vian pritrakton de ĉi tiu kroma temo /pri niaj E - elsendoj/ sendu al ni en la sama koverto kune kun la unua temo, sed tamen nepre sur aparta paperfolio, por faciligi nian administran laboron kaj la lotumadon de premioj. Sur ĉi tiu kroma paperfolio ankoraŭfoje skribu /tre klare/ viajn nomon kaj adreson.

La konkurso povas partopreni ankau tiuj, kiuj na auskultas, sed tamen volas prezenti sian generalan opinion pri la valoro de la esperantlingvaj radioelsendoj por la movado. La duoblan konkurson oni povas partopreni nur per la respondo al unu el la temoj au per du respondoj /aparte pri Jarkvardeko kaj aparte pri la Jarkudekkvino/, ĉar tiam oni havos ŝancon gajni ĉu du premiojn.

Pri la amplekso de la respondo ĉiu persono decida mem, sed ni estus dankemaj ankau pro iom vastaj respondoj.

La konkursoj oni sendu al la adreso:

RADIO POLONIA, Esperanto-Redakcio, "Konkurso",
00-950 VARSOVIO, Box-46, POLLANDO.

La konkursoj oni sendu ĝis la 30-a de novembro 1984. Kiel kutime decidas la dato de la posta stampo.

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en ĉiuj niaj elsendoj la 31-an de januaro 1985.

Inter la partoprenantoj de la konkurso ni lotumos multe da objektaĵoj premioj en la formo de elfaraĵoj de pola popolaro, sondiskoj kaj sonkasetoj kun registraĵoj de pola serioza, popola kaj distra muziko, fotoalbumoj pri la historio kaj nuno de nia lando. Krome ni lotumos E-librojn, inter kiuj troviĝos "Lingvo Internacia" de Doktoro Esperanto /el 1887/.

Výtvarná řemesla Praha
Vám nabízejí široký
sortiment bytových
doplňků a dárkových
a upomínkových předmětů,
vyráběných převážně
v malých
seriích s častou inovací.

Nabízíme:

soustružené mocca soupravy
soustružené odkládací stolky
malované porcelánové soupravy i jednotlivé kusy
malované a broušené vázy, mísy a popelníky
výrobky z cínu
bižuterii kovovou a koženou
a další sortiment z kovu, kůže, koženky, textilu.

Adresy prodejen upomínkových a dárkových předmětů:

110 00 Praha 1, Národní tř. 37	22 41 94
110 00 Praha 1, Vodičkova 28	24 47 71
110 00 Praha 1, Spálená 39	29 27 04
110 00 Praha 1, Na poštách 35	23 17 315
110 00 Praha 1, Klášterní nám. 2	26 63 28
120 00 Praha 2, Anglická 18	25 98 56
110 00 Praha 1, Lazarská 5	29 83 22
110 00 Praha 1, Železná 12	22 79 14
170 00 Praha 7, Obránců míru 17	37 44 84
110 00 Praha 1, Městek - stanice metra	26 14 19
360 00 Karlovy Vary, Mariánská 2	930/28 381

V našich prodejnách
naleznete vhodné dárky
pro každou příležitost.
Naše pracovníce Vás
ochotně obslouží
a pomohou vybrat
předmět,
který po žád.

Vzorkovna nábytku:

110 00 Praha 1, Václavské nám. 41	26 40 64
přijímá objednávky na individuální zakázky nábytku a byt. doplňků.	

ELKO

MNOHO ŠŤASTNÝCH KILOMETRŮ
S VÝROBKY V.D. ELKO NOVÝ KNÍN

zástěrky přední typ UNIVERSAL pro osobní automobily ŠKODA řady 105, 120 a GARDE vč. modelů r. 1984

zástěrky zadní a přední pro vozy VAZ
opěrky hlavy

autoklíny

univerzální skládací stahováky SR 2
stahováky brzdových bubnů SR 3

v. d. NOVÝ KNÍN

KDS

Sedlčany

KVALITAJ TRANČ-PRODUKTOJ

Kuirejaj kaj viandistaj tranĉiloj
ĝardenistaj tondiloj de diversaj
tipoj
tondiloj por la kureja prilaboro
de kortbirdoj
higiena ilaro - ungo-fajliletoj
- raspiletoj por la
malmola haŭto

Fabrikas KDS SEDLČANY ĈSSR
Eksportas MERKURIA Praha

ESA M 80



ESTAS PRAKTIKA HELPANTO POR HEJMO.ĜI
OFERTAS VICON DA AVANTAĜOJ

- SIMPLAN PRISERVON
- MAPRIGRANDAN MANIPULADON
- MAL LONGAN TEMPON POR GLADI
- MALALTAN KONSUMON DE ELEKTROENERGIO
- ESTETIKAN FORMON KAJ ALIAJN

TEKNIKAJN DATOJN:


ELEKTROKURENTO	220 V / 50 HZ
BEZONO DE ENERGIO	2060 W
2 TERMOSTATOJ	20-250° C
LONGECO	960 mm
LARĜECO	290 mm
ALTECO	350 mm
PEZECO	28 kg
PREZO	4.340 Kčs.

PRODUKTAS

Elektrodružstvo

PRAHA 8, KUNDRATKA 17

ČKD PRAHA



Esperanto

Produkta kooperativo ZNAK Hradec Králové aĉetas jenajn plumarspecojn:

plumaron de ora fazano
plumaron de perdriko
plumaron de numido
kokajn kurtenetojn sur-

kolajn

Prezo de plumaro estos fiksita post la unira kontrolo en la produkta kooperativo ZNAK Hradec Králové. La aĉetsumon ni sendas perpoŝte. Plumaron sendu laŭ la adreso

ZNAK výrobní družstvo,
Pražská 686/501 01 Hradec Králové

Objednávka / knihy /				
Marček, Markovič	: Instrua amuzo	po 14,--Kčs		Ks
Voĉoj de postoj el la spirita mondo		po 12,--Kčs		Ks
Kum Velkov	: Vilaĝo Borovo	po 21,--Kčs		Ks
Nikola Vapcarov	: Elektitaj vers.	po 6,--Kčs		Ks
H. Rhoden	: M. Gandhi	po 17,--Kčs		Ks
K. Ĉapek	: Rakontoj ..	po 27,--Kčs		Ks
Meze de Eŭropo/ historio de ĈSSR/		po 15,--Kčs		Ks
S. Kamarýt	: Historio de E-o movado en ĈSR	po 42,--Kčs		Ks
L. Prachař	: Uĉebnice pro dět	po 14,--Kčs		Ks
"	" 2. díl	po 24,50Kčs		Ks
Esperanto- fakta a dokumenty/novinka/		po 9,--Kčs		Ks
Plastické tašky s E potiskem		po 2,50Kčs		Ks
Esperantské pexeso z dovozu		po 6,50Kčs		Ks

..... PSČ

celá vaše adresa/ piště čitelně /

V dne 1984

.....
váš podpis

Objednávka / časopisů z Č E S /				
Heroldo de Esperanto / Španělsko / ...		po 165,--Kčs		Ročník
Paco, národní čísla vč. separátu		po 16,--Kčs		ročník
Internacia Fervojisto / FRG/		po 35,--Kčs		ročník
Homo kaj Kosmo / jugoslavie /		po 45,--Kčs		ročník
Starto , zasílat do ĈSSR		po 24,--Kčs		ročník
" zasílat do zahraničí		po 38,--Kčs		ročník
Sano , zasílat do ĈSSR		po 24,--Kčs		ročník
" zasílat do zahraničí		po 36,--Kčs		ročník
Scienca revuo / Itálie /		po 100,--Kčs		ročník
Dia Regno / Holandsko /		po 60,--Kčs		ročník
Budapesta Informilo		po 35,--Kčs		ročník

V objednávce uveďte kolik ročníků objednáváte. Platby je nutno zaslat nejdéle do konce roku 1984/ u HdE nejdéle do konce listopadu 84/ na účet svazu.

..... PSČ

celá vaše adresa/vyplnit čitelně/

V dne 1984

.....
podpis objednavatele

ČESKÝ

ESPERANTSKÝ SVAZ

JILSKÁ 10

PRAHA 1

1 1 0 0 0 III

ČESKÝ

ESPERANTSKÝ SVAZ

JILSKÁ 10

PRAHA 1

1 1 0 0 0 III



**celostátní
servis
sovětských
foto-kino přístrojů**

VÝROBNÍ
DRUŽSTVO



MECHANIKA TEPLICE

MECHANIKA, VD, Teplice, provádí opravy sovětských foto-kino přístrojů a expozimetrů ve svých provozovnách:

TEREZÍN	-	ZÁSILKOVÁ SLUŽBA Tyršova 211, Terezín	PSČ 411 55	tel. 92207
LITOMĚŘICE	-	provozovna a sběrna oprav Lidická 5, Litoměřice	PSČ 412 01	tel. 2004
TEPLICE	-	provozovna a sběrna oprav Vítězná ul., LUNA Teplice	PSČ 415 01	
BRNO	-	provozovna a sběrna oprav Leninova 41A, Brno	PSČ 602 00	tel. 753498
PRAHA	-	provozovna a sběrna oprav Francouzská 34, Praha 2	PSČ 120 00	tel. 255315
BRATISLAVA	-	provozovna a sběrna oprav Šmeralova 11, Bratislava	PSC 811 03	tel. 312264
OSTRAVA	-	provozovna a sběrna oprav Gottwaldova 275, Ostrava	PSČ 701 00	tel. 54691



ZLATNÍK

DUV ZLATNÍK OSTRAVA ZHOTOVUJE
ZLATÉ ŠPERKY Z MATERIÁLŮ DODA-
NÉHO ZÁKAZNÍKEM. PŘIJĎTE SI VYBRAT
Z BOHATÉ KOLEKCE VZORŮ NA NAŠE
PRODEJNY UMÍSTĚNÉ V OKRESECH
OSTRAVA, OPAVA, FRÝDEK-MÍSTEK,
KARVINÁ, NOVÝ JIČÍN, BRUNTÁL A
PŘEROV.

PRO POTŘEBY ŠIROKÉ VEŘEJNOSTI
VYRÁBÍME ELEKTRICKÁ SAUNOVÁ
KAMNA O PŘÍKONU 6 A 9 kW, KUKAČ-
KOVÉ HODINY, VYSOUŠEČE VLASŮ,
SKLÁDACÍ TURISTICKÉ LOPATKY, ČE-
SÁČKY OVOCE A PÍŠŤALKY PRO VÝCVIK
PSŮ.

VÝROBKY ZASÍLÁME POŠTOU NA DOBÍRKU.

DRUŽSTVO UMĚLECKÉ VÝROBY.

729 12 OSTRAVA 1, Smetanovo nám. 7



VALNÍKY
A ÚČELOVÉ
NÁSTAVBY
AVIA A21/A31

AVIA N.P. PRAHA 9 • BRNO • IVANČICE • ŽILINA •

TVAR

VD TVAR Pardubice je monopolním výrobcem sportovních ochranných přileb značka CASSIDA. Tyto přilby obdržíte v prodejnách Domácích potřeb, Drobného zboží a Mototechny.


Zájemcům zašleme požadovaný typ přilby prostřednictvím našich služeb
TVAR VD
Jägermanova 1682
530 03 PARDUBICE

Ni tutkore invitas vin partopreni nian duoblan konkurson kaj petas diskonigi ĝin inter viaj gekonatoj, leteramikoj, sam-klubanoj, partoprenantoj de E-kursoj kaj membroj de Esperantistaj Radio-Klubo. Ni estos tute aparte dankemaj al la redaktoroj de E-revuoj, klubaj informiloj kaj bultenoj pro la publikigo de la informo pri nia duobla konkurso en plena aŭ mallongigita varianto.

Uzante la okazon ni deziras rememorigi, ke en niaj elsendoj ni dediĉas multe da atento al polaj kaj E-movadaĵoj temoj, kiujn ĉefe ni mem elektas kaj enprogramigas. Tamen nun - okaze de nia Jubileo ni dezirus inviti vin al la kunredakto de la elsendoj. Ni proponas nome, ke vi sendu al ni liston de la proponataj de vi konkretaj temoj polaj kaj E-movadaĵoj, kiujn - laŭ via opinio - ni devus pritrakti en la proksima estonto. La listigitajn temojn sendu sur aparta paperfolio, sed en la sama koverto. Farigu KUNREDAKTORO DE VIAJ ESPERANTO-ELSENDOJ!

Finante ni refoje invitas vin partopreni nian duoblan konkurson kaj deziras al vi bonŝancon dum la lotumado de la premioj.

RADIO POLONIA
ESPERANTO-REDAKCIO



ni recenzas

Aristo Gorov: RIBELA KORDO

Poemaro. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 1983. Kajero, formato 14x20 cm, paĝoj 71, prezo Kcs.16,--.

Sur 68 paĝoj en 38 poemoj kaj 3 paĝoj de autobiografio rakontas al ni la fama bulgara esperantisto surbaze de siaj spertoj kaj partopreno en la subtera movado kaj gerilmilito. En la 29-parta poemaro "Poemo de la plugisto" li rivelas antaŭ ni vivon kaj batalon de juna proleta ribelulo kaj lia amatino Zonjo ĝis la amara fino. La eposecajn senmetaforajn versojn, kun iom lamaj ritmoj kaj dubaj rimoj, al kiuj ofte sklavas la sencoj, ĝen ilustru fragmentoj:

Virino svelta haltas antaŭ ili / kaj la amanto ion ĉakas tri-
li / premante al li sian belan buston, / kaj ambau pasas
en butikon luksan. / Slav' vagas plue en la strat' lumple-
na / inter feliĉaj paroj amserenaj / preter' kinejoj, kies
lumreklamoj / allogas per la filmoj melodramaj. / En mok-
tomezo trovas la azilon / por senhavuloj nia povra viro. /

La poemaro preskau ne enhavas lingvajn malkorektaĵojn kaj presekarojn, kaj al tiu, kiu ne submetas ĝin el severa poetika prijuĝo, ĝi havas kelkion sciindan por diri.

J. Kořínek

Před týdnem vyšla pro posluchače filozofických a pedagogických fakult učebnice jazykovědy /SPN Praha, 1984/, v níž je velmi pěkná stať o esperantu. Domnívám se, že by si zasloužila ocitování /bod 8.3.14, str. 133 - 134/ ve STARTU:

"Co se týká perspektiv dalšího vývoje jazyků, lze počítat v blízké budoucnosti se zmenšováním jejich počtu. Jazyky, jimiž mluví jen zcela malý počet osob, jsou patrně odsouzeny k zániku. Některé z nich ustoupí velkým evropským jazykům /např. v Americe/, jiné zaniknou v rámci integrace vedoucí ke vzniku národních jazyků /v Asii, Africe aj./ Stále intenzivnější kontakty mezi národy povedou k povlovnému sblížení jejich jazyků, zejména v oblasti lexika. Tento vývoj probíhá již v současnosti: v souvislosti s rozvojem vědy a techniky neustále přibývá mezinárodních termínů. Zda tento vývoj může někdy ve vzdálené budoucnosti vyústit ve splývání jazyků a posleze vést k vytvoření jednotného jazyka lidstva, nelze prozatím předvídat. Potřeba univerzálního dorozumívacího prostředku /všesvětového jazyka/ se ovšem pocituje velmi silně již v současné době. Z prestižních důvodů nemůže tuto funkci plnit žádný z existujících velkých jazyků: proto má v OSN status oficiálních jazyků pět světových jazyků /ruština, angličtina, francouzština, španělština, čínština/. Tato potřeba vedla k četným pokusům vytvořit všesvětový jazyk umělou cestou: volapük, esperanto, ido, okcidental, novial aj. Z těchto "umělých jazyků" se trvale ujal pouze esperanto.

I přes námitky, jež bývají proti umělým jazykům vznášeny, nelze vyloučit možnost, že se esperanto /nebo jiný umělý jazyk/ jednou stane univerzálním pomocným dorozumívacím prostředkem v oblasti diplomacie, vědy, sportu apod.

M. Malovec

Resumo: En Prago /1984/ aperis altlerneja lernolibro "Fundamentoj de lingvistiko" de d-ro Adolf Erhart. Aŭtoro reale supozas eblecon, ke Esperanto unufoje stariĝos universala, helpa kaj interkonsenta rimedo en sferoj diplomatie, scienca, sporta k.s.

Lorjak: EŬLALIA

Originala romano. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 1984. Paĝoj 188, formato 14x20 cm, kartonita.

En bela tipografio vesto prezentiĝas al ni distra romano de lastatempe fekunda aŭtoro sub pseudonimo Lorjak. Laŭ lia konfeso en la antaŭparolo la libro ne pretendas esti ia literatura ĉefverko, sed pli vere amuza, sufiĉe absorba legaĵo de leĝera genro laŭ tipo de porvojaĝaj posromanaj.

El ingrediencoj de sentimentala ĝorto de povra junulino-fabriklaboristino, el kiu fine elkoviĝas perdita filino de riĉa altrungulo, el ŝia kamarado sindikata sekretario, ŝin noble kaj energie helpanta - por fine elinkognitigi kiel usona lunvojaĝa

kosmonaŭto kaj filo de riĉulo kaj ekamita fianĉo, el pluaĵoj, ĉiuj sen profunda psikologia karakterizado, el iom da kriminalromana gangsterismo, el iom da kico, iom da parodio, iom da s-fikcio, iom da socialromana porlaborista partianemo, multe da fantazio, skeca ĉe groteska humoro kreigas tiu romano, kiu vin sciigos agrable amuzi. Por la senluziigitaj diras postparolo la aŭtoro: Ne protestu. Vi estis avertitaj /en la sprita antaŭparolo/.

Pri la lingva flanko eblas diri, ke ĝi estas relative bona. La preĝeraroj ne tro multas. Plurloke la aŭtoro emas surprizi rotkvicece per nekutimaĵoj. Ie tio sukcesas, ie maskigas divemigaj netravideblaĵoj. La malkorektaĵoj nepiel esence malpligrigas la valoron de tiu ĉi plua bela eldonaĵo de la aprezinde aktiva Hungara Esperanto-Asocio.

J. Kořínek

DILEMOJ DE LA NUNTEMPO - VIDE EL HUNGARIO

Supertitolo: Socio - ekonomio - komunikado. Ses aŭtoroj. Redaktis Sándor Révész. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1984. Formato 14,5x20,5 cm, paĝoj 102.

La libro estas pruvo, ke la hungaraj kamaradoj eldonadas ne nur beletron, sed ankaŭ verkojn sciencajn. Kiel diras la supertitolo, temas pri tri fakoj de la homa agado, kiel vidas ilin la hungaraj specialistoj. La ses traktaĵoj eksplikas la problemojn:

SOCIAJ INSIDJOJ: Pri tio, kiel profiteco povas kaŭzi damaĝon al profiteculo mem.

ALIE AL UNUECA TEORIO DE SOCIA KOMUNIKADO KAJ KULTURO: Eseo pri rilato de laborista klaso al kulturaj valoroj.

EKONOMIAJ SEKURECO KAJ EVOLUO EN LA MONDEKONOMIO DE LA SEKVONTAJ JARDEKOJ: Traktaĵo pri faktoroj de la ekonomia sekureco en la nacia ekonomio kaj pri ties danĝeroj pro troigo de la sekureco; pri ŝanĝoj de la stabileco de la ekonomio en la nuna epoksango; pri la ebleco de la ekonomia sekureco por ĉiuj; pri deveno de la ekonomia sekureco; ĉu eblas "senpolitikigo" de la ekonomiaj kontaktoj surbaze de internacia interkonsento; ktp.

MONDMODELOJ, RAPORTOJ PRI LA TUTMONDAJ PROBLEMOJ KAJ LA LONGPERIODA PLANADO EN HUNGARIO: Precipe temas ĉi tie pri la demografia eksplodo, pri elcerpigo de la fontoj de nereprodukteblaj krudmaterialoj kaj energioj, malsufiĉo de la nutraĵoj k. s.

NOTOJ PRI LA VALORO DE LA INFORMOJ: Provo, po elementoj analizi la paradokson, kiu karakterizas la orienteuropajn socialismajn sociojn.

INFORMO KAJ SOCIO: Rezonado pri tio, kio ŝanĝiĝis en nia epoko kaj kial venis informo en la centron de la interesiĝo.

Lingve perfekta libro, kun minimumo da preseraroj. Rekomendinda por ĉiuj, kiuj studas la prezentatajn temojn kaj rezonas pri ili.

A. Staňura

Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj verkitaj originale en Esperanto de d-ro Endre Dudich. Eldonis Scienca Eldona Centro de UEA, Budapeŝto, 1984. La verko ampleksas 150 pagojn plus 68 pagojn da scienc-teknikaj anoncoj kun la formato 230x165 mm. La sola distribuanto estas la Libroservo de UEA.

Ĉi tiu altnivela enkonduko en la geologion estas la plej grava kaj plej ampleksa antaŭenpaŝo sur la kampo de tiu scienco en la Internacia Lingvo. La aŭtoro traktas en populariga maniero tra 12 ĉapitroj la jenajn subbranĉojn de la geologio: geomomion, geokemion, mineralogion, dinamikan geologion, petrologion kaj sedimentologion, paleontologion, tektonikon, terinteron, ter-historion kaj stratigrafion, aplikajn geofizikajn kaj geologion, kosmogeologion kaj planedologion.

Ĉiun ĉapitron akompanas abundaj figuroj kaj tabeloj, kiuj vivigas kaj klarigas la tekston. Fine aperas geologia leksikoneto kaj listo de rekomendita Esperanta kaj alilingva literaturo. Antaŭparolon verkis ing. Petar Todorov, estrarano de UEA pri faka agado.

Eldona Fako de UEA

el leterkesto

D-ro István NAGY
Szabó Ilonka u.31
1015 BUDAPEŬTO

Budapeŝto, 84.07.25.

Kara Redaktoro!

En la radiodigaŭdigo de Radio Polonia mi audis, ke mia artikolo PRI ESPERANTO KIEL PO-NTLINGVO aperis en STARTO. Mi ricevas la gazeton ekde jaroj ĉiude BUDAPEŬTA INFORMILO, sed ĉi tiun numeron mi ankoraŭ ne vidis. Eble pro la libtempo. Tamen, se eblas, ĉu vi povus sendi al mi tiun numeron? Anticipan dankon!

Plaĉis al mi la artikolo de s-ano M. Malovec ESPERANTO KIEL EDUKILO /1/1984/. Mia artikolo pri ESPERANTO KAJ LATINO aperis en la hungarlingva poresperanta gazeto MONDO KAJ LINGVO /la dua parto jarfine/, ja la temo min interesas.

Kiom da similaj bonegaj artikoloj prilingvaj kaj primovadaj /kiel tiu de s-ano M. Malovec/ aperas en gazetoj, kiuj atingas nur malgrandan legantaron.

Almenaŭ Universala Esperanto-Asocio menciis ilin de tempo al tempo en sia revuo!

Sinceran saluton sendas

d-ro I. Nagy

V E N I S A L M I E N L A K A P O N . . .

Se oni legas Esperantajn gazetojn, ofte trovas en ili strangaĵojn, kiu pensigas la legantojn. Ec, ne necesas le-

gi, sufiĉas iom pensadi pri nia lingvo kaj movado.

x x x

Pli utilas silentema akademiano, kiu tiam ekvocas, kiam necesas, silente laboras, uzas Zamenhofan lingvon, t.e. puran, evoluantan, klaran, havas opinion, kiam oni lin demandas, ol akademiano, kiu por pruvi sian gravecon skribas-verkas pri cio, kio hazardas venas al li en la ĉerbon, ĝenerale pri bagatelaĵoj, maĉas-remacas tute ne ekzistantajn lingvajn problemojn, kiuj tute ne venas en la mensojn de la aliaj akademianoj, kaj per mil vortoj li klarigas tion, kio troviĝas en PAG au PIV. Imagu, karaj legantoj, se la samon farus ĉiuj akademianoj!

x x x

Al prestiĝa gazeto mi sendis primovadan artikolon. Ĝi aperis. Mi daurigis la samajn pensojn en nova artikolo. Aerpoŝte venis la averto. Nur mallongan artikolon kaj nur malofte sendi ion. Do, ne la enhavo gravas, sed la longeco kaj pensadi maksimume dufoje jare. Jene estu.

x x x

Eble sonas nekredeble, sed multaj esperantistoj el la Esperantaj tradukoj konatigas kun kelkaj verkoj de la nacia literaturo. Kion iu nacilingve ne legas, volonte legas tion en Esperanto. Kial? Nacilingve staras je lia/sia dispono miloj da romanoj. En Esperanta traduko - bedaŭrinde - nur malmultaj, do oni pensas: se la verko estas tradukita en Esperanton, certe valoras la penon ĝin legi. Ec ĉi-kaze esperantisto pli volonte legas la Esperantan tradukon ol la originalan. La samo rilatas al la fremdlingva literaturo. Ne unu verko estas tradukita ekzemple el la ĉeĥa en la hungaran. En la hungara traduko oni

aĝetas tiujn tradukojn kies aŭtoroj estas konataj aŭ la kritikilo laudas la libron. Se el tiuj verkoj iu estas eldonita ankau en Esperanto, estas jam du kaŭzoj ĝin aĉeti kaj legi. Kaj kial ne en sia dua gepatra lingvo, en Esperanto?

x x x

La malamikoj de Esperanto konvinkige asertas, ke Esperanto disfalos en dialektojn, se ĝi iam disvastiĝos en la mondo. Ni konvinkige asertas, ke tio ne okazos; la argumentoj nun ne gravas. Se ili atentę observas nian gazetaron, nun ĝoje ili trovas pruvon por ilia aserto. Jen, kion skribas akademiano Bernard Golden, la "faktotuma kaj ĉioscianta lingvisto" /konstato de A. de Giorgi pri li en "Hungara vivo" / en "Budapeŝta Informilo", Centra organo de la Hungara Esperanto-Asocio /aprilo 1984/: "Pluraj ekzemploj de laumorfema tradukado troviĝas en la malgrandaj Esperantaj vortaroj nuntempe haveblaj en Hungario kaj disvastiĝo de tiuj hungarismoj en ĉiuspecaj publikigaĵoj donas al la Internacia Lingvo en Hungario dialekta karakteron." Ĉu rideti, prisi-lenti la tuton, informi la Akademion? La malamikoj de Esperanto ne malesperu! Ilia aserton nun skribe pravas: akademiano. La disfalo de Esperanto en dialektojn komenciĝis en la lando de Baghy kaj Kalocsay, ho ve ĝuste antau la centjariĝo. Eble jam pretiĝas la premiĝta eseo: La neevitebla dialektigo de Esperanto. Al tio sufiĉas nur "malgrandaj Esperantaj vortaroj" - lau B.G./La vortarojn lingve kontrolis Baghy kaj Kalocsay/.

x x x

La Esperantaj libroj ne vendigas - ofte oni povas audi. Kompreneble jene estas, se mi la acetanto trovigas en Budapeŝto kaj la libro en Roterdamo au Tokio. Japana Esperanto-Instituto vendis librojn por 104.298 guldenoj en 1982 /Esperanto, junio 1983/ kaj UEA samjare ĉ. por 180.000 guldenoj. Mia opinio la problemo el tio ekestas, ke la libroj ne atingas la legemulojn kaj libroamantojn. Poje iu UK povus okupiĝi krom la elektita tutmonda problemo /kongresa temo/ ankau pri unu grava Esperanto-problemo /lingva au movada temo/ kaj mi tuĵ proponas: Eldo-

no-vendo-aceto de la Esperantaj libroj. Jen la pruvo, ke la esperantistaro acetas librojn, se ili havas eblon. Dum la 68-a Universala Kongreso en Budapeŝto, la valoro de la venditaj libroj "dum unu semajno" estis ĉ. 250.000 forintoj /ĉ. 5.500 usonaj dolaroj lau oficiala kurzo/, kvankam en la kongreso ne la libroamantaj esperantistoj kunvenis, sed rekontigis libroj kaj kongresantoj. Dekmiloj da acetemuloj en la tuta mondo trovigis hejme. Ĉi tiu problemo meritis pli da atento.

D-ro I. Nagy

INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

PROGRAMLABORO DE ARTLITERATURA SEKCIO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO
EN LA JARO 1985

FEBRUARO 1985:

Pri la tradukado en Esperanton kun specimenoj kaj pri iama kunlaboro kun prof-ro Miloš LUKÁŠ /s-ino Matyková/.

MARTO 1985:

Pri la preparata libro "Mezinárodní řeč - utopie a fakta" /PhDr. Jaromír JERMAŘ, CSc./; inviti prof-ron Zima.

APRILIO 1985:

Informo pri la publikaĵo de la aŭtoroj URBANOVÁ, RUMLER, KAREN kaj VIDMAN: "Kvarfolio" /Urbanová/; pli detala informo pri la laboro rilate al sinonima vortaro /Vidman/.

MAJO 1985:

Kritika analizo de la traduko de la libro "Básník neumírá" de merita artisto d-ro František KOŽÍK en la traduko de Jiří KAREN /Karen/.

JUNIO 1985:

Kritika analizo de la libro "Poeto fajrakora" de Marjorie BOULTON /Rumler/.

JUNIO 1985:

Kunvenoj ne okazas /ferioj/.

- - -

RIMARKOJ:

- laŭeble envicigota parolado de redaktoro Ivo ŽELEZNÝ pri sci-fi-literaturo en Esperanto;
- interŝanĝo de la unuopaj programoj ebla;
- ĉiuj kunvenoj de Artliteratura sekcio de ĈEA okazas la trian /au la lastan/ sabaton enmonate je la 14,00 horo en klubbejo de EKP, Prago 1, Vejvodova strato n-ro 1;
- kiu interesiĝas el la nein-

vitataj aŭ male ne volas ricevi la invitilon, sciigu tion al s-ino Tatána KRISTOFO-

VÁ, poŝtkesto 660, 111 21 PRAGO 1.

Artliteratura sekcio de ĈEA, Jiří Karen, p.m.

ESPERANTO KAJ LA "SPECIFO DE NACIA LINGVO"

UNU EL MANIEROJ POR NIA INFORMADO
/el letero de nia leganto al la Radio/

Estimataj kamaradoj! Laŭ mia konvinko vi diris senbaze, en la elsendo "METEOR" 10. 3. 1984, ke "artefarita" lingvo, kiel Esperanto, ne taugas, ĉar ĝi ne kapablas esprimi la "nacion specifajn" /národní specifikum/.

Anstataŭ diskut-kontribuo mi prezentas al vi por afabla pripenso la opinion /vidu la almetitan fotokopion de la koncerna informo en "MLADÝ SVĚT", n-ro 7/84/ de la skotlanda publicisto Reto ROSSETTI, profesoro, pri Esperantaj tradukaĵoj el la ĉeĥa literaturo. Lia eldiro evidente rilatas tiun "nacion specifajn" kaj estas esprimo de tute mala sperto de tiu ĉi verkisto.

Reto ROSSETTI, svisa italo vivanta en Skotlando, deklaris en kunveno de la Esperantista Verkista Asocio, okazinta kadre de la Universala Esperanto-Kongreso 1983 en Budapeŝto, ke en Esperanto fascinas lin du verkoj: La Brava soldato Ŝvejk de Jaroslav Hašek kaj la Bapto de caro Vladimiro de K. H. Borovský. Li ĉe mendis lernolibron de la ĉeĥa lingvo, ingruiston kaj lernis iom la ĉe-

ĥan por povi tralegi la verkojn en la originaloj kaj prijugi, ĉu la tradukoj estas vere bonaj. Li konstatis, ke la Bapto de caro Vladimiro estas ankoraŭ pli bona - precipe lau la "muzika" flanko. Kiel dokumenton pri siaj vortoj li posedas magnetofajn bendojn, kie estas registritaj versoj kaj en la ĉeĥa lingvo kaj en Esperanto. "Kaj se ne ekzistus Esperanto, mi neniam sciigus pri verkoj de Julius Fučík kaj Karel Čapek", li deklaris. - Tio "MLADÝ SVĚT".

Mi ankoraŭ aldonas el interparolo kun prof. ROSSETTI, ke komparinte la anglan tradukon de la "MAJO" de Mácha kaj la Esperantan /fare de T. Pumpr/ li trovis: la Esperanta traduko multe superas la kvaliton de la anglalingva.

Alivorte: per Esperanto estas esprimita tio, kion vi nomas nacia specifaĵo, pli trafe ol per alia nacia lingvo, ĵen per la angla.

J. Mařík.

14-A VINTRA ESPERANTISTA FERIO 1984-12-28-1985-01-02

Organizanto: Budapeŝta Komitato de Hungara Esperanto-Asocio.
Hungara peranto: Esperanto Sekcio de Vojaĝoficejo "EXPRESS" - Szabadság ter 16, 1054 BUDAPEŬTO V., Hungario.

Loĝkondiĉoj: 2-3-4 litaj ĉambroj en Studenta Hotelo kaj Studenta Hejmo.

Loko de la renkonto: Kulturcentro "Láng", Rozsnyai u.3, Budapeŝto XIII.

Mangaĵoj: 3 foje po tage. La mangaĵoj okazas ĉiam en "Láng".

PROVIZORA PROGRAMO:

28.12.1984 - Alveno, akcepto, enlokitado. Vespere oficiala inaŭguro de la arango kun vespermango kaj interkona vespero. Ludas "FAJRETO" la duoo de "Láng".

29.12.1984 - matenmango, TUTTAGA EKSKURSO - vizito aŭ en agrikultura aŭ en industria kooperativo per tagmango, vespermango, TEATRA VESPERO.

30.12.1984 - matenmango, VEF-Seminaro I., Tagmango, Urborigardado-orgenkoncerto en la katedralo MATYÁS, vespermango, KIU KION SCIAS PRI ESPERANTO? - kvizo, LUDU, KANTU KUN NI! - komuna ludo.

31.12.1984 - matenmango, VEF-Seminaro II., Planetario, esperantlingva prezentado, Tagmango, libera tempo, INTERNACIA SILVESTRA BALO ĝis la 05,00 matene - ludas ensemblo "POLARYS".

01.01.1985 - matenmango en mangpakaĵoj, dormado, tagmango, Filmokotelo en Kulturcentro "Láng", Oficiala fermo de la renkonto kaj ADIAŬA VESPERO per vespermango.

02.01.1985 - matenmango
merkredo - poste forveturo
labortago/

UNUA SERVO: vespermango la 28-an de decembro 1984; LASTA SERVO: matenmango la 2-an de januaro 1985.

La partoprenkotizo inkluzivas la tranoktadon, ĉion mango, ĉion programeron, la tuttagan ekskurson kaj la enirbileton al la Internacia Silvestra Ballo kun festa mangaĵo kaj trinkaĵo.

Partoprenkotizo por partoprenantoj el socialismaj landoj: en du-lita ĉambro Kĉs 1.780,-- Kĉs kaj en 3-4 lita ĉambro Kĉs 1.650,--.

Interesigantoj aliĝu al:

- en POLLANDO - ESPERANTOTUR, Bydgoszcz, ul. Marie Skłodowskiej Curie n-ro 10;
- en BULGARIO - INTERNACIA ESPERANTO KURSEJO, str. Ilarion Makariopolski n-ro 4, 1202 Sofio;
- en Ĉeĥoslovakio - Ĉeĥa kaj Slovaka Esperanto-Asocioj. PAGI VI POVAS REKTE PERE DE ĈEA EN ĈS.KRONOJ!

Aliĝdato: la 15-an de novembro 1984!

HELPINDA STUDPROJEKTO DE PATRICK PETIOT

Por la jaro 1987-a, la juna poligloto Patrick PETIOT /Cai-xa Postal 96920 - Nova Friburgo - RJ, BR - 28.600 BRAZILLO/, proponis sin kolekti materialon kaj fari studon por pre-

zenti al UNESKO verkaĵon, kiu povos atesti la realan utilon kaj forton de Esperanto en la kampo de komunikado. La projekto - en la unua fazo - temas pri kolektado de fotografiaĵoj pri sildoj koncernantaj al "sano" kaj "higieno", kun la

respektivaj simboloj. Kial tia studado? "Car -klarigas PETIOT en sia cirkulero de 83.08.26. - ne ekzistas vida internacia kodo, kiu ebligas la turistojn trovi kuraciston, apotekon, gastejon, muzeon... kiam ili troviĝas en malsamkultura lando. Komunaj simboloj en Eŭropo /tiel kiel krucoj, la A gotikaj, la serpentsceptroj de la Dio Merkuro, kiuj identigas la apotekon/ ne havas ian signifon orientlande. Do, ekzistas intereso kolekti, klasigi arojn de fotoĵoj por montri ekzemplerojn de kulturoj popularaj, regionaj, tradiciaj el la tuta mondo kaj klopodi stabiligi internacian vidan kodon rilate al tio, pri kio pleje interesigas la turistojn".

La esperantistaro povas helpi la junulon PETIOT, sendante al li fotojn pri sildojn rilatajn al:
- Kuracistoj, dentistoj, veterinaroj, apotekoj ...
- Urgaj helpoj, hospitaloj ...
- Optikoj, aparatoj por surdeco ...
- Popularaj medicino kaj apoteko, banejoj, masaĝoj ...
- Hartondejoj, higienaj materialoj ...

Dorsflanke de la fotoj bv. fari klarigon en Esperanto, pri nomo de la lando, urbo, lingvo tie parolata, speco de la anoncata sana aŭ higiena aktiveco kaj, kompreneble, informi la nomon kaj adreson de la sendinto.

PATRICK PETIOT,
CP 96920-Nova Friburgo,
28600 - BRAZILLO.

SOVETA ESPERANTISTA TENDARO

La 25-an de junio ĝis 4-an de julio en Armenio apud urbo Jerevan okazis Okcidenta Sovetia Esperantista Junulara Tendaro /OkSEJT-26/.

En la tendaro partoprenis 250 reprezentantoj de 12 respublikoj el 57 urboj de Sovetunio. Tie funkciis kursoj por komencantoj kaj progresantoj, kursoj de tradukarto sub gvido de B.KOLKER, somera Universitato. Esperantistoj partoprenis seminariojn de aktivuloj, de instruistoj kaj porpagan sabatlaboron, monon de kiu sendis en Fonduso de Paco.

Enkadre de la kultura programo okazis: vespero de lumbildoj kaj filmoj, koncerto de reprezentantoj de respublikoj, de komencantoj, tago de naskigintoj, tre interesaj ekskursoj tra la antikvaj lokoj de Armenio - Garni, Gehard, Ecmiadzin, Sardarapat, interesa nacia festo "VARDAR" kun elpaso de ensemblo de popolaj dancoj kaj dancensemblo de la Pionira Palaco, sportintersango de internacia edukado de junularo.

Certe restas neforgeseblaj la noktoj de la tendara fajro, kantoj kun gitara akompano, dancoj, ludoj.

Aleksandr RYBALOV,
membro de Kieva
E-klubo "Ora pordego"

KRONIKO

Anna Ryznarová, membrino de la nia asocio forpasis nin en la aĝo 84. Ŝi mortis 28.07.1984. Memoru kun ni ŝian oran koron!

Jana Kočvarová kaj Ivan Galuszka anoncis al ni, ke ilia edzigeŝto okazis 15a de septembro. Ni gratulas al ili kaj deziras multe da novaj membroj por nia asocio!

Přiblížil se rok 1985

a tím i placení členských příspěvků. Nezapomente, že i Váš členský příspěvek se stává jedním z podstatných finančních zdrojů našeho svazu. Tím, že jej uhraďte do konce roku své místní skupině zajistí se pro ni rovněž zdroj financí k její činnosti. Individuální členové nechtě nečekají a platí přímo na účet našeho svazu.

REDAKTAJ LIMDATOJ POR STARTO 1 9 8 5 :			
le numero 1.....	16.01	le numero 4	16.07.
le numero 2	15.03	le numero 5	14.09
le numero 3	15.05	le numero 6	06.11



Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs au 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Diana UNGER, 16-jara knabino, Damjanich u.11, 7624 PÉCS, Hungario, dez.kor. pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

Ramón ASTRADA, Est.7, Malvinas Argentinas 1475, 5900 VILLA MARIA /CBA/, Argentino, dez.kor. kun geamikoj el ĈSSR kaj intersangi STARTON.

Grazyna MIRKIEWICZ, 24-jara kemistino, ul.Hubska 119/34, 50-501 WROCŁAW, Pollando, dez.kor. pri turismo, E-movado, fotografado.

Aleš ONDRÁČEK, 17-jara, Výškovická ul.102, 704 00 OSTRAVA -

VA - ZÁŘEH, Ĉeĥoslovakio, interesigas muzikojn.

Laura KRAFFT, 17-jara studentino, jud.Harghita, 4159 - ODAND, Rumanio, dez.kor. pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

Ibolya KÁSZONI, 17-jara studentino, Bul.Independentei m. 80, Bedean Bl.D3, Ap.4, jud.Harghita, 4150 ODORHEIU - Sec, Rumanio, dez.kor. pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

Erzsébet KOZÁK, 17-jara studentino, Bul.Independentei m. 80, Bedean Bl.D3, Ap.4, jud.Harghita, 4150 ODORHEIU - Sec, Rumanio, dez.kor. pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

Irén BÁN, 17-jara studentino, Bedean II, Fierarilor Bl.I, et.2, ap.11, Harghita, 4150 ODORHEIU, Rumanio, dez.kor. pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

Rozália SZÁSZ, 17-jara studentino, Str. Bai-Sarate, n-ro 6, 4150 ODORHEIU-Sec, Harghita, Rumanio, dez.kor. pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

Éva TAMÁS, 17-jara studentino, 4160 DEALU 184, Harghita.

Rumanio, dez.kor. pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

Katalin TORNAI, 17-jara studentino, Budvár 14, 4150 ODORHEIU-Sec, Harghita, Rumanio, dez.kor. pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

Melinda ANDRÁSI, 17-jara studentino, 4168 MORĂRENI 215, Harghita, Rumanio, dez.kor. pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

Anikó MENYHART, 17-jara studentino, 4160 Tâmbau 48, Harghita, Rumanio, dez.kor. pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

Zelma MIKLÓS, 17-jara studentino, 4194 SAIA 148, Harghita, Rumanio, dez.kor. pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

Hilda KAFFAI, 15-jara studentino, Salcimului 30, 3295 SOVATA, jud. Mureş, Rumanio, dez.kor. pri lit., arto, muziko, sporto k. vivo de junularo.

HELPU DOKTORIGI! Mi preparas disertacion "Interlingvistikaj konceptoj ekde 1945", bezonas ajnaj interlingvistikajn periodaĵojn, artikolojn, librojn, lingvoprojektojn kaj in-

formojn pri ili. Rekompenco laŭ interkonsento. Aleksandro MELNIKOV, a. ja. 393, SU - 344 007 ROSTOV - DON, Sovetunio. Dankon!

FAKDELEGITO DE UEA por heraldiko serĉas libron de Walter Leonhard "DAS GROSSE BUCH DER WAPPENKUNST" /= "Grande Libro de la Blazonarto"/, eld. Verlag Georg D. W. Callwey, FRG, 1978. Rekompence estas proponataj samvaloraj libroj pri pentroarto, aplika arto au aliaj laŭ deziro. La sciigojn etendas JAROSLAV KLEMENT, kpt. Nálepky 7, CS-360 B4 KARLOVY VARY, ĈSSR.

KULTURBUND der Deutschen Demokratischen Republik, Organiza Komitato - IFER.

Leipzig, la 20-an de junio '84.

Estimataj gesamideanoj!
En la nuna jaro la tradicia IFER/Internacia Foira Esperantista Renkontigo/ bedaŭrinde - pro teknikaj malfacilaĵoj - ne okazis.

Do ni ĝojas povi informi vin, ke de la 8-a ĝis 10-a de marto 1985 IFER denove estos. Pliaj informoj sekvos.

Dankon!
Organiza Komitato de IFER.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská strato 10, 110 00 PRAHA 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6 foje jare. Responda redaktoro ZDENKO KRÍMSKÝ. Grafika arango MILAN LABAŠTA. Desegnaĵoj PAVEL RAK. Transdonita al presejo la 27-an de septembro 1984. Jarabono Kčs 24, --, por eksterlando Kčs 36, -- au 10,50 gld, inkluzive sendkostojn. Abonantoj turnigu al miaj perantoj, al UEA au rektvoje al nia asocio.

STARTO - nepravdivelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská ul. 10, 110 00 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Odpovědný redaktor Zdenko KRÍMSKÝ. Grafická úprava MILAN LABAŠTA. Kresby PAVEL RAK. Tisk zajišťuje technické ústředí knihoven, Praha. Předáno do tisku dne 27. září 1984. Roční předplatné Kčs 24, --, pro zahraničí Kčs 36, -- nebo 10,50 guldenů, včetně poštovních výloh. Dohledací pošta Praha 07. Snižovaný poplatek za poštovně povolen Reditelství pošt Praha pod č. jedn. P/1 - 1267 ze dne 6. dubna 1979.

ĜIS REVIDO...


Teksto - muziko:

Imre Szabó

László Zsoltos

4t = 7"


MARŜO




Ĝis re - vi - do, ĝis re - vi - do, ĝis




ĝis ĝis ĝis ĝis ĝis ĝis re - vi - do, ĝis re -



vi - do, ĝis ĝis ĝis ĝis ĝis ĝis ĝis re -




vi - do ge - sa - mi - de - a - noj, ĝis ĝis ĝis ĝis ĝis



ĝis ĝis re - vi - do en Augs - bur - go. ĝis



ĝis ĝis ĝis ĝis ĝis ĝis re - vi - do, en Augs



bur - go. ĝis ĝis ĝis ĝis ĝis.

KOVOVÉ METALAJ REMIZOJ GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbot-
avolo - duparta pordego - deklina
tegmento - sen planko - facila mun-
tado au sur submuro au sur ebe-
na tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Largo 3030 mm alto 2450 mm estas
egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malon-
ga tempo 1-2 monatoj liveras

INKLEMO

PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adre-
so de komerca fako: INKLEMO PRA-
HA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA
9, Spojovací 11, autelefonu al n-ro 83 09 49.
Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la
kooperativo. Transporton ni povas certigi. Re-
mizojn ni liveras nur al privatuloj.

Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10

Noviny

DOHLÉDACÍ POŠTA PRAHA 07,
SNÍŽENÝ POŠTOVNÍ POPLATEK
POVOLEN ŘEDITELSTVÍM POŠT PRAHA
J.ZN. P/1 - 1267/79 ZE DNE 6.4.1979